Johann Wolfgang von Goethe,

Elf-reĝo

tradukita de Antoni Grabowski

Kiu rajdas tra nokt', kun vent' pro l' vet'?
Jen estas patro kun infanet':
Li havas knabon en zorga pen',
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.

"Filet', vi kial ektremis pro tim'?"
"Patreto, jen! elfreĝ' en proksim'!
La elforeĝo, kun vost' kaj kron'!"
"Filet', ĝi estas nebulzon'."

"Ho venu do, infan' al mi!
Mi belajn ludojn ludos kun vi:
Ĉe l' bordo brilas kolora flor',
Mia panjo havas vestojn el or'!"

"Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',
Kion promesas elfreĝ' en sekret'?" —
"Ne timu, filet', ne timu vi,
Murmuras vent' en velka foli'."

"Knabeto bela, sekvu min',
La filinoj miaj vartados vin'.
La filinoj, lertaj en danca rond-form',
Kantante, dancante vin lulos al dorm'."

...

”Patret’, ĉu vi vidas, patret“, mia kar’?
En lok’ malhela jen elfinar’!”
“Filet’, filet’, mi vidas precize: [2]
Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize.”

“Mi amas vin, ĉarma vi, mia knabet’,
Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet’!”
“Patreto, patreto, li prenas min for!
Elfreĝo kaptas min, ho dolor’!”

La patro ektremis, kun granda rapid’
Li rajdas, kaj plende en brak’ ĝemas l’ id’.
Alvenas patr’ al hejma kort’,
L’ infanon prenis jam for la mort’.

Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-588-1694 (2013-02-26 14:50:24)

[2] Mi, Manfred Retzlaff, proponas por tio, ke la rimvortoj estu – same kiel en la originale – akcentataj sur la lasta silabo, jenan ŝanĝon:
„Fileto, precize mi vida ĝin:
La grizaj salikoj jen trompas vin.“